

Sendependa revuo en Esperanto

# Tra la mondo

《一带一路·环球》杂志（世界语版）· 中德合作· 面向世界

Esperanto-urbo

Esperanto-Centro

Scienco

Turismo

Edukado

Rakonto

Infano

Pensado

Esperanto en universitatoj



ISSN 2512-5040

N-ro 4 (4) Novembro 2017

## Tra la mondo

Sendependa trimonata revuo  
fondita la 1-an de januaro 2017  
en reta kaj papera formatoj A4(202×268)



ISSN 2512-5060

### Kotizo

La reta versio estas senpage elŝutebla ĉe:  
<http://tra-la-mondo.esperanto-urbo.de>  
La paperan version ricevas nur pagantoj.  
Mondonaco al la eldonejo estas bonvena.

### Direktoro de la eldonejo

Peter Zilvar

### Eldonejo de Tra la mondo

Interkultura Centro Herzberg  
DE-37412 Herzberg/Harz,  
Grubenhagenstr. 6. Germanio  
Tel/Fakso: 0049/(0)5521-5983,  
Poŝtelefono: 0049/(0)160-98754-190  
<http://tra-la-mondo.esperanto-urbo.de>  
[esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

### Honora Ĉefredaktoro

Zsófia Kóródy



### Ĉefredaktoro

Trezoro Huang Yinbao  
Esperanto-Centro Ora Ponto  
Jingchuan-Xian Jinqiao Guoji  
744300, Pingliang Gansu, Ĉinio  
Tel: +86 (0) 933 3329289, +86 (0) 18893316800  
[trezoro@qq.com](mailto:trezoro@qq.com), [agrikulturo@126.com](mailto:agrikulturo@126.com)

### Kunlaborantoj de la aktuala numero

Gajo Li Chuanhua  
Ardo Hu Guopeng  
Meng Yuli

### Kunlabora organizo

Esperanto-Muzeo Zaozhuang Ĉinio

## ENHAVO

### Esperanto-urbo

Internacie lerni – internacie festi en Interkultura Centro Herzberg. .... 87  
La 11-jara jubileo de Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo ..... 88

### Medicino

Ĉina kuracisto de akupunkturo kaj mokso laboras en Ĉefio ..... 89

### Esperanto-Centro

Mirinda renkontiĝo en Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio ..... 90

### Esperanto-tagoj

La 53-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj 2017 ..... 92

### Scienco

Ĉu scienco estas la nura fidinda informofonto? ..... 94  
Spinaco estas riĉa je fero ..... 95

### Turismo

La turisma vilaĝo “Bela Fenikso” uzas Esperanton ..... 96

### Edukado

La ŝlosilo al flueco - Frua legokapablo ..... 98

### Rakonto

La pavino - princino ..... 100

### Infano

Gaja knabineto Matensuno en Esperantujo ..... 102

### Pensado

Kiom da parolantoj de Esperanto en Ĉinio? ..... 104  
Kial oni ne lernas Esperanton? ..... 106

### Esperanto en universitatoj en Ĉinio

150 studentoj lernas Esperanton en Zaozhuang Universitato ..... 107  
70 studentoj lernas Esperanton en Jiangsu-a Teknologia Universitato .... 108  
1000 studentoj lernas Esperanton en la Artkolegio de Kunming ..... 109  
Esperanto-aktivaĵo en Pekina Lingva kaj Kultura Universitato ..... 111

Bildo sur la fronta kovrilo: Kongtong-monto en Pingliang (*Wu Ye*)  
Bildo sur la dorsa kovrilo: Ŝtona pentraĵo pri Zamenhof (*Wu Dongmei*)  
La emblemon de la revuo desegnis LA-Arts (*Hungario*)

La kvaran numeron pretigis la redakta teamo en 2017, kaj per tio ni finas sukcesan jaron. La ricevitaj reagoj estas pozitivaj, la legantaro estas vere internacia kaj kreskanta. Tio donas al ni pluan forton.

Ankaŭ tiu ĉi numero prezentas varian temaron, peras informojn el diversaj anguloj de la mondo. Aparte volonte ni raportas pri la junularo, pri kursoj kaj pri instruado de Esperanto, ĉar tiuj estas faroj por la futuro kaj rekte ligiĝas al la disvastigo de nia internacia lingvo.

Ni esperas, ke la klare strukturita enhavtabelo helpas la legantojn trovi taŭgajn legaĵojn laŭ siaj intereso kaj instigos kontribuemulojn sendi novajn materialojn por la venontaj numeroj de nia revuo. Agrablan legadon!

Peter Zilvar, direktoro de la eldonejo de *Tra la mondo*



# Internacie lerni – internacie festi en Interkultura Centro Herzberg



■ *Zsófia Kóródy (Germanio)*

Lerni Esperanton oni povas aŭtodidakte ĉu ekzemple el lernolibroj ĉu per retkursoj, tamen multe pli efika kaj alloga povas esti lerni ĝin en intensa kurso kun helpo de instruisto kaj parolpartneroj por rekta komunikado en realaj vivsituacioj. Tuja utiligado de la lernitaj vortoj kaj gramatiko povas okazi konversacianta kun alilandanoj, alilingvanoj, kiam Esperanto servas kiel nepra komunikilo. Por doni tian lerneblon kaj ŝancon por lingvoekzercado ni organizis dusemajnan someran Esperanto-perfektigon (SEP) por komencintoj kaj perfektigemuloj en Interkultura Centro Herzberg en julio 2017. Partopreno eblis ankaŭ parttempe, sed plej bone sukcesis en la lernado kaj ekzercado tiuj, kiuj restis dum la tuta periodo. Estis bone, ke en ambaŭ semajnoj kaj en ambaŭ grupoj partoprenis kursanoj el malsamaj

landoj, do formiĝis vere internacia lernantaro kaj ekestis internacia etoso. Ĉefe instruis Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar. La lernritmon ni adaptis al la kapabloj kaj bezonoj de la kursanoj kaj ni provizis ilin per taŭga vortprovizo, parolturnoj, lern- kaj legomaterialoj. La tuttaga lernado, la ĉeesto de spertaj instruistoj kaj lingvouzantoj ebligis ankaŭ laŭbezonan individuan helpon, konsultadon kaj kontroladon de la evoluo de lingvaj kapabloj. Dank' al la bonega somera vetero ni povis havi la Esperanto-lecionojn en freŝa aero, en tendo-pavilono aŭ subĉiele en la bela Esperanto-ĝardeno.

Posttagmeze ofte okazis urborigardado kun ĉiĉeronado kaj ekskursoj al allogaj najbaraj turismaj lokoj, historiaj urboj, kiel ekz. al Duderstadt, Osterode am Harz, Bad Lauterberg. Vespere ni havis komunajn festojn: krad-rostado,

kuiradon de hungara gulaŝsupo en granda kaldrono sur fajro kaj pretiĝis tipan manĝaĵon laŭ recepto el Kubo. Kun helpo de talentaj, muzikemaj partoprenantoj ni ofte havis kulturprogramon, koncertojn, komunan kantadon en la ĝardeno.

La kursanoj ne nur lingve spertiĝis dum la restado en Herzberg, sed ricevis ankaŭ multajn informojn pri la internacia Esperanto-movado, pri organizaĵoj, eventoj, libroj, gazetoj kaj aliaj servoj por la lingvouzantoj. Ili multon lernis ankaŭ unu de la aliaj: pri landoj kaj ties tradicioj, kulturo, historio kaj nuntempa vivo. Tre granda sukceso estis ekzemple en la urba biblioteko la interesa prelego de Ariadna pri la belega insulo Kubo kaj pri la tiea Esperanto-movado, kaj multajn allogis ankaŭ la instruado de kubaj dancoj sur la teraso de la Esperanto-Centro.



# La 11-jara jubileo de Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo

En internacia rondo, kun partoprenantoj de la intensa lingvokurso, klubanoj, geamikoj de la Esperanto-Centro kaj vizitantoj okazis la jubilea festo de Herzberg am Harz kiel Esperanto-urbo. Malgraŭ la pluva, malvarmeta vetero regis bona estoso. Post salutado kaj retrorigardo al la eventoj, agadoj en la lasta jardeko Peter Zilvar, prezidanto de la loka Esperanto-klubo transdonis memormedalonojn al kelkaj aktivaj kunlaborantoj de la Esperanto-Centro. La bela artobjekto surhavas la blazonon de Herzberg sur unu flanko kaj portreton de Zamenhof sur la alia. Ĝi estas valora memorigilo ankaŭ pri la 100-a mortodatreveno de Zamenhof, iniciatoro de Esperanto.

Ankaŭ en julio 2018 ni planas organizi similan intensan Esperanto-kurson kaj oferti aldone belajn ekskursojn en la regiono. En la sekva jaro ni festos la 25-jaran jubileon de la oficiala urba partnereco inter Herzberg am Harz kaj ĝia pola ĝemelurbo Góra. Bv. rigardi por detaloj la jarkalendaron de 2018 sur nia hejmpaĝo: <http://esperanto-urbo.de>.

Bonvenon al Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo por lerni la internacian lingvon en internacia medio kaj ekhavi belajn travivaĵojn per Esperanto!

*Zsófia Kóródy (Germanio)*





# Ĉina kuracisto de akupunkturo kaj mokso laboras en Ĉeĥio

La 5-an de aŭgusto mia bofilo Ma Wen flugis de Ŝanhajo al Praha la ĉefurbo de Ĉeĥio. Li estas kuracisto de akupunkturo kaj mokso en la Ŝanhaja Shuguang-Hospitalo, la plej granda hospitalo per ĉina tradicia medicino en Ŝanhajo. Sendita de la hospitalo, li laboros unu jaron en la Ĉina Tradicia Medicina Centro en Ĉeĥio.

Sekve de la ekonomia evoluo de Ĉinio, la ĉina tradicia kulturo estas pli kaj pli komprenita de eksterlandanoj, kaj la antikva ĉina tradicia medicino

altiras la atenton kaj intereson de la internacia komunumo. Precipe la kuracado per magia akupunkturo kaj mokso estas vaste rekonita kaj bonvenigita tutmonde. Kiel grava parto de kulturaj interŝanĝoj de la iniciato "La Zono kaj Vojo", la ĉina tradicia medicino alportos bonon al homoj sur "La Zono kaj Vojo".

La centro situas en la urbeto Hradec Kralove de Ĉeĥio. Ĝi estas la unua kunlabora projekto en centr-orienta Eŭropo pri ĉina tradicia medicino. Ĝi

estas fondita en septembro 2015. Nun la centro kuracas ĉirkaŭ 30 malsanulojn ĉiutage. Multaj malsanuloj sentas pliboniĝojn je siaj malsanaj simptomoj. Krom la kuracado la ĉinaj kuracistoj ofte instruas la malsanulojn ankaŭ pri resanigaj ekzercoj per ĉinaj tradiciaj metodoj Tajĝjio, Ĉjigong, Ba Duan Jin, ktp.

Karaj amikoj, se vi bezonas tian helpon, bonvolu kontakti kun la centro kaj mia bofilo, d-ro Ma Wen.

*Teksto kaj fotoj de s-ro Arbsemo*



# Mirinda renkontiĝo en Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio

中国涪川·王母宫景区

Mi estas emerita franca fervojisto kiu vivas kun emerita ĉina fervojistino dum longa tempo en Changsha (Provinco Hunan). Nia komuna lingvo estas Esperanto. Mia edzino proponis al mi viziti la "Esperanton Centron Ora Ponto" kiun estras Trezoro (S-ro HUANG Yinbao). Mi interkonsentis kun Trezoro por praktiki Esperanton kun tri novaj kaj junaj esperantistoj dum 10 tagoj en junio. Li diris al mi "vi ne bezonas prepari kurson de Esperanto, nur bonvolu paroligi ilin".

La 4-an de junio mi forveturis al Jingchuan (Provinco Gansu) en Norda Ĉinio. Mi trajnveturis dum 24 horoj (1500 km) de Changsha al Pingliang kaj survoje mi vidis tre belajn kamparajn kaj montarajn pejzaĝojn! Trezoro afable akceptis min en la stacidomo de Pingliang kaj ŝoforis min al la "Esperanto-Centro Ora Ponto" en Jingchuan.

Ĉi tie mi interkonatiĝis kun tri junaj esperantistoj (32 ĝis 40 jaroj) Hirunda kaj Songbo estas instruistoj de la angla en la meza lernejo. Jana kiu laboras por Esperanto en "Centro Ora Ponto" estas juna patrino de petolemaj kaj ĉarmaj infanoj. Ili estas progresantoj ĉar foje juna usonano instruis al ili Esperanton ĉi tie. Pro tio estis pli facile al mi por komuniki kun ili ĉar mi ne parolas ĉine.

Mi ne preparis lernmaterialon antaŭ la forveturo. Mi uzis la surlokan materialon de la "Centro" kiel la tekstojn kaj la demandojn de la ĉina lernolibro "Moderna Esperanto (II)". Mi elektis ankaŭ interesajn dialogojn el la revuo "Juna Amiko" de ILEI kaj artikolojn el la revuo "Monato". La temoj estis tre diversaj: ĉiutaga vivo, kutimoj, rakontoj, kulturoj kaj teknikoj. Ĉefe mi celis paroligi la homojn. Unue laŭvoĉe ni legis la tekstojn. Poste uzante "PIV" aŭ "Esperanta Vortaro por Lernantoj" mi klarigis al ili la vortojn kiujn ili ne konis. Ankaŭ ili uzis la vortaron Esperanto-ĉinan instalitan en siaj poŝtelefonoj. Kelkfoje mi klarigis per gestoj aŭ per bildoj la signifojn de la vortoj. Finfine mi faris demandojn pri la enhavo de la rakontoj kaj dialogoj. Sukcese ili respondis al multaj demandoj. Eĉ ili faris demandojn al mi! Ni parolis pri aliaj temoj kiuj ne kuŝis en niaj materialoj. Tiumaniere ni interŝanĝis sciojn pri diversaj kulturoj en Ĉinio kaj Francio. Tio estis tre interesa por mi kaj ili. Mi lernis multe dank'al ili!

Ili diris al mi ke ili devas lerni multe da novaj vortoj kiuj estas tre malproksimaj al la ĉina lingvo. Du lernantoj scipovas paroli la anglan. Tio certe helpas ilin. Jana pli penas ĉar ŝi neniam lernis fremdan lingvon. Tio estas tute normala. Tamen mi sentis ke ili ĉiuj progresis multe en kelkaj tagoj.

Ili estis tre bonhumoraj, laboremaj kaj diligentaj. Ni laboris pli ol 6 horojn tage eĉ sabate kaj dimanĉe. Ili sentis ke ili progresas praktikante Esperanton kaj havas motivon lerni kaj uzi ĝin. Pro tio ili estis tre kontentaj. Ili regalis min en restoracio de tempo al tempo kaj gastigis min hejme. Mi konatiĝis kun simpatiaj familianoj! Kelkfoje kiam sunis ni faris nian kurson en la naturo



kaj vizitis kelkajn belajn lokojn.

Ankaŭ kun ili mi promenis en Jingchuan kie oni tre rigardis min ĉar fremdlandanoj tre malofte venas ĉi tien. La etoso estas tre bona tie: homoj sidas apud sia domo kaj diskutas kun najbaroj kaj eĉ kartludas kaj maĝangas (Mah-jong). Multaj ĉinoj estas sportemaj sur la placoj; ili dancas, gimnastikas, praktikas tajĝĉuanon, ankaŭ ili muzikas per diversaj instrumentoj.



中国涪川·大云寺



中国涪川·田家沟

La lastan tagon ni kune vespermanĝis, tri lernantoj, Trezoro kaj Ardo. Trezoro proponis regulon. Tiu kiu krokodilos, eĉ diros unu ĉinan vorton ĉe la tablo pagu la manĝon! Tio ne okazis! Ili sukcesis la finan ekzamenon! La tri spertuloj Ardo, Trezoro kaj mi miris ke ili multe babilis en Esperanto. Ni gratulis ilin! Mi proponis ke ili kontaktu min per skajpo aŭ "QQ" por praktiki Esperanton. Mi promesis sonregistri la dialogojn kaj rakontojn de la lernolibro "Moderna Esperanto (II)" ĉar tio mankas. Laŭ mi sonregistraĵo de la lecionoj devas akompani la lernolibron por ke la lernantoj bone prononcu la lingvon. Do, mi faris kiam mi revenis hejmen kaj sendis la sonregistraĵojn al ili per interreto. Songbo de sia flanko legis kelkajn tekstojn kaj

sendis al ni ĉiuj per "QQ". Bona ideo ĉar tio kuraĝigas ilin progresi!

Mi esperas ke ni renkontiĝos tie en Jingchuan aŭ ie en Esperantujo! Mi imagas ke ili poste pli flue parolos Esperante!

Ankaŭ Trezoro tre ŝatus ke aliaj eksterlandanoj praktiku aŭ instru Esperanton tie por kuraĝigi la lernantojn kaj poste ke ili iĝu instruistoj. Bedaŭrinde multaj ĉinoj ne havas okazon interparoli kun eksterlandanoj kaj ankaŭ oni bezonas en la lando spertajn intruistojn de Esperanto. Do, karaj legantoj vi faros bonan sperton kaj tutcerte helpos ilin se vi venos al la "Esperanto-Centro Ora Ponto", vi ne bedaŭros!

HENRY Bruno, Changsha, 2017/07/03, [esperanto.bhenry@yahoo.fr](mailto:esperanto.bhenry@yahoo.fr), QQ: 2723929344



Tra la mondo 4 (4) Oktobro 2017



中国涪川·金桥国际科技文化交流中心

# La 53-aj Baltiaj Esperanto-tagoj 2017



BET53 okazis en la latva urbo Liepajo, 220 km okcidente de la ĉefurbo Rigo, inter la lago Liepaja kaj la Balta maro. El la loĝantaro de la urbo pli ol duono estas latvalingvaj, sed preskaŭ duono ruslingvaj, kaj aldone minoritatoj pola, litova, belorusa k.a. La arkitekturo de la urbo varias: imponaj modernaj konstruaĵoj, ekzemple la nova koncertejo Lielais Dzintars, kiu estas sukceso-kolora cilindro, pluraj domegoj en la stilo Nova Arto de la 19a jarcento, brikaĵoj domoj, kaj kvazaŭ folkloraj lignaj dometoj kun baritaj kortoj, ĝardenoj, kun etoso fabela aŭ mizera, preĝejoj luteranaj, katolikaj kaj ortodoksa. Latvoj estas lertaj lignaĵistoj. En la katolika katedralo de Sankta Josefo mi plej admiris la tajlitajn fino-bretojn de la benkoj, en ortodoksaj preĝejoj admirindas i.a. la ikonoj. La ĉefaj stratoj de Liepajo larĝas kaj rektas asfaltitaj. La pli malgrandaj stratoj kaj vojetoj estas mallarĝaj, ŝtone pavimitaj aŭ sablaj. Ofte ilin ornamas florarangoj kaj maljunaj verdaj arbegoj, herbejoj. La aero en julio estis freŝa, kun malvarmeta brizo eĉ en la plej sunaj tagoj. Kelktage pluvus.

Ĉiu Esperanto-evento bezonas fidindan volontularon por ke la pagoj, loĝigo, manĝigo, programo, ekskursoj, koncertoj, vizitoj, akceptoj kaj ĉio alia glate iru, la bulteno aperu kaj la

komputiloj senĝene funkcii. Trioblan huraon al la helpantaro de BET! Ili sukcese elturniĝis el siaj streĉigaj taskoj. Belga partopreninto esprimis sian admiron dirante, ke nenie ekster Baltio la esperantistoj povus havi tiel altnivelan kulturalan programon. Ni profitis ankaŭ de la malaltaj (al A-landanoj) prezoj en trafiko, manĝejoj kaj hoteletoj.

La ĉambroj de la BETeĵo, la 6a mezlernejo de Liepajo, estis nomataj laŭ famuloj de la latva E-movado: Eduardo Jaunvalks, Lidija Lange, Ernesto Drenzen, Rudolf Stammers kaj la kantistino Austra Pumpure, forpasinta en januaro 2017. La BET-bulteno nomiĝis La Verda Tilio, ĉar tilio estas unu el la simboloj de la urbo. Diversspeciaj bonodoraj tilioj tie floras unu specio post la alia. Tilio estas konsiderata virineca kaj kverko vireca.

La tuttaga busa ekskurso direktiĝis al la urbo Kuldigo. Survoje ni konatiĝis kun bienkasteloj, kultivado de ŝitakefungoj, ekologiaj bero-vinoj kaj niaj sambusanoj. La duontaga ekskurso montris al ni (fi)faman prizonon Karosta, el kiu neniu malliberulo povis eskapi. La gardistoj aranĝis por ni kvazaŭ rolludon traktante nin rigore kiel kaptitojn dum la rakontoj pri cara, soveta kaj germana pasinto. En la fino oni regalis nin per vodko kaj eta

buterpaneto kun salega fiŝaĵo. Ĉe la Nordaj fortikaĵoj ni estis enkondukitaj en subterajn defendo-koridorojn ĉe torĉolumo. Ekstere muĝis la maro. Liepajo ja estas la urbo kie, laŭ la urba himno, naskiĝas la vento. Alitage, dum urba promenado, ni vizitis la 8-kilometran plaĝon. Niaj bravuloj senvestiĝis por plonĝi en la nevarmajn ondojn, aliaj kontentis rigardi la sunsubiron kaj sensuigi sin por senti la farune fajnan preskaŭ blankan sablon. Revenvoje al BETeĵo ni vidis statuojn kun motivoj el la liepaja himno kaj mano-spurojn de artistoj premitajn en ŝtono. En la pavimo jen kaj jen vidiĝis muzika noto.

La kultura programo enhavis prelegojn kaj bildoprezentojn: la historio de la E-movado en Liepajo, decimala klasifikado de libroj en bibliotekoj (rubriko tamen "Du pacbatalantoj"!!), seminario pri la juda demando kaj homaranismo, efikoj de la brita secesio "brexit", prezentado de la komuna historio de Finnlando kaj Liepajo (spicita per operomuziko), bildoj kaj memoroj pri Nepalo, sciigoj pri Esperanto-libroj eldonitaj en la 21a jc en Bjalistoko, informado pri la enhavo de manĝaĵo-etikedoj, ekspozicio pri falerestiko, t.e. Esperanto emblemoj kaj insignoj.

Al la kultura programo aldoniĝis kariljona koncerto, koncerto de Sepa





Popolmuzikistinoj en la adiaŭa vespero

kaj Asorti, pianokonzerto de Jerzy Dobrzynski, teatraĵo de "Vantulinoj", popolmuziko kaj komuna dancado en la adiaŭa vespero. Ni ankaŭ kunkantis esperantigitajn latvajn kantojn. El unu mi tre impresiĝis: "Ju pli multe mi malgajas/des pli gajas la ĉagren'/Subŝtonigas mi ĉagrenon/kaj kantante transas ĝin/ ram taj ram taj radiridi ridi/ ram taj ridi ralala.." La melodio gaje spitas mizeriĝojn, en plirapidiganta takto! Dum la adiaŭa festomango ni povis gustumi

specialaĵojn de latva kuirarto, ne nur bongustajn sed bele faritajn. Tiajn franco nomus hors-d'oeuvre.

Kompreneble okazis trinivelaj lingvokursoj kaj oni povis eklerni la latvan eksprese. Ni vizitis la Urbodomon, invitatitaj de la vicurbestro Gunars Ansinš. Tie ni vidis filmetojn pri Liepajo kaj rajtis meti demandojn al la invifinto. Ni ankaŭ ricevis broŝurojn kaj skribilon, sakon.

Proksime al la hoteleto Sporthotel situas naturrezervejo sur lagobordo.

Vespera aŭ matena promonado sur longa mallarĝa lignoponteto apenaŭ super la akvonivelo al turo por observi kaj aŭskulti birdojn plaĉas al homoj, kiuj ŝatas trankvilon, foriĝon el urbaj scenoj.

AL BET53 aliĝis pli ol du cent homoj el dudeko da landoj, sed bedaŭrinde ne ĉiuj sukcesis alveni. Ili multon perdis!

*Raita Pyhälä, Finnlando*



Vicurbestro Gunars Ansinš kun interpretanta esperantisto Aldis Busš en la urbodomo



Tagmango en lernejo

# Ĉu scienco estas la nura fidinda informofonto?

■ *Wendel Pontes (Brazilo)\**

Evidente danke al la scienca metodo la homaro spertis nekontesteblan disvolviĝon pri la kompreno de la mekanismoj de la naturo. Sen ĝi, neniuj fundamenta teknologio estus disponebla. Pri sano kaj vivkvalito, ne estas sufiĉe da vortoj por esprimi, kiel per scienco ni malkovris novajn efikajn medikamentojn kaj terapiojn, kiuj plilongigas nian vivon kaj plibonigas nian vivkvaliton. Nek precize esprimi kiel ni sukcesis altigi nian manĝaĵan produktadon por nutri miliardon da homoj en la mondo. Malgraŭ la konstantaj problemoj de nia civilizacio, ignori la gravecon de scienco por homa specio estas naive kaj volonte blindigi nin.

Pro tio, scienca metodo fariĝis ege fidinda. Ĉefe kiam oni pritraktas neevidentajn asertojn, aŭ donas al ni solidajn pruvojn pri hipotezoj aŭ teorioj ankoraŭ ne firme konvinkitaj. Tamen, malgraŭ ĉio ni ankoraŭ alfrontas rezistemon kontraŭ la per-science-pruvitaj asertoj.

Se vi bone komprenas la sciencon metodon, vi scias ke ĝi ne estas intuicia. Ĝi evoluis per eksperimentoj kaj ankaŭ per nuntempaj paradigmoj, ĝenerale akceptataj de la plejmulto el la profesiuloj en siaj respektivaj fakoj. Sed ĝi estas esence homa mekanismo por malkovri al si kiel funkcias la naturaj leĝoj – se vi permesas al mi uzi la esprimon – kaj uzi ilin por nia bonfarto kaj kontentigo. Samkiel scienco, kompreneble estas aliaj mekanismoj, per kiuj oni malkovras al si pri la mondo, kaj kiuj evidente ne estas sciencaj, kaj ne pro tio ili malpravas.

Scienco estas metodika kaj longdaŭra. Tamen por kelkaj aspektoj de nia vivo, ni ne povas doni al ni la komforton tiom longe atendi ĝis ekhavi sufiĉajn pruvojn por decidi pri ĉio. Se oni informas min pri la danĝereco de speciala placo kien mi intencas iri, ekde specifa horaro, mi certe ne traserĉos la statistikojn laŭlonge jardekoj por konkludi, ke ĝi estas vere danĝera. Tiu decido ne estas absolute scienca, kaj havas altan verŝajnecon esti vera – surbaze de la fidemo de la fonto, certe.

La samo okazas kiam oni proponas al ni specialan frandaĵon. Gustumi kaj ŝati



ne dependas de scienca metodo, kaj nepre tio ne malhelpas ke ni ade propagandu la bongustaĵon al ĉiuj. Vi ne faris eksperimenton pri tio, tamen via informo ne estas malfidinda aŭ suspektinda nur ĉar vi volas, ke aliaj ĝuu la saman kontentigan senton per manĝado de la specifa frandaĵo.

Samkiel tiu ekzemplo, multfoje niaj decidoj pri la vivo ne dependas de apliko

de sciencaj metodoj, kaj ne pro tio ili estas malkorektaj. Persona sperto estas ero el la diversaj manieroj ekhavi konon pri io ajn, samkiel scienco. Ni vivas per diversaj fontoj je konoj, kaj estas ili kiuj igas nin esti ni mem.

*\*Wendel T. Pontes, Profesoro pri Zoologio en Universitato Federal de Pernambuco, Brazilo. Fakdelegito de UEA pri Zoologio, Entomologio kaj Scienca Metodo. Vicprezidanto de ISAE.*

# Spinaco estas riĉa je fero

Popeye estas simpatia trompisto, senpudora fanfaronulo, kies ŝtala sano certe ne devenas el la nutraj virtoj de la spinacoj. Kaj ĉiu, kiu volus lin imiti, multe pli bone farus, se li manĝus la tutan ladskatolon anstataŭ la foliojn ene.

Origina el Persujo, ĉi tiu planto efektive entenas feron: kun ĉirkaŭ po tri miligramoj de fero en cent gramoj de legomo, ĝi estas multe pli bonefika ol multaj fruktoj. Sed, kompare kun manĝaĵoj kiel lentoj aŭ sukero, ovoj kaj marfruktoj, ĝi estas mapli riĉa je fero.

Krome, en viando, kie tiu metalo estas ligata al hemoglobino, fero havas la duoblan avantaĝon ĉeesti en pli

granda kvanto kaj esti pli facile sorbebla de nia korpo. Do, manĝi porcion da hepato multe pli utilas ol manĝi kilogramojn de spinacoj.

En la jardeko 1890-1900 usona sciencisto faris analizojn al spinaca folio sed, laŭ la tradicia legendo, lia sekretariino falis en eraron skribante per sia tajpilo. En la linio "fero" ŝi skribis "30 mg" anstataŭ "3 mg"; ĉimaniere al la legomo estis tuj atribuita eksterordinara dozo de fero, pere de simpla malgranda eraro en la pozicio de komo.

Nur dum la tridekaj jaroj de la pasinta jarcento kelkaj germanaj sciencistoj restarigis la veron, sed sensukcese. Ekde la jaro 1933, la

desegnistoj Dave kaj Max Fleischer kreis la novan heroon, Popeye, grandan ŝatanton de spinacoj.

Graven rolon ludis poste la usona naciisma propagando dum la Dua Mondmilito, kiam oni povis aŭdi frazojn tiajn: "Usono havas sufiĉan forton por ĉesigi la militon, ĉar ĝi manĝas spinacojn".

Dank' al Popeye, la usona konsumo de spinacoj pligrandiĝis je 33%.

*El la originala artikolo de François Féron, en la libro "Gli spinaci sono ricchi di ferro – I luoghi comuni della scienza" de Jean-François Bouvet*

## Plantoj ne parolas

Estis iam raso de antilopoj, kiuj posedis la ĉarman nomon de "kudu", tre aprezataj pro la beleco de iliaj kornoj. Por eviti, ke ili estu definitive ĉasataj de la ĉasistoj, oni decidis ilin protekti malantaŭ ĉirkaŭbarilo, en la nacia rezervejo Kruger, proksime al Pretoria (Sudafriko). Komence, la kudu-j satplenigis sin per molaj herboj kaj junaj ŝosoj, sed poste la savano iĝis malpli komforta kaj ili devis elekti malpli bonan manĝaĵon: la akaciajn foliojn. Tre malbonŝance.

Oni plu ne aŭdis tie la pafojn de la ĉasistoj, sed la morto estis ankoraŭ embuskaŝita.

Fakte, post apenaŭ du tagoj multaj kudu-j kuŝis mortintaj sub la akacioj, pro superdozo de tanino, sekreciita de tiaj arbaj folioj. La sudafrika zoologo Van Hoven sin demandis, kiel povis okazi, ke la ĝirafoj senprobleme paŝtiĝis

dum la antilopoj mortis. Ĉar la plantoj lernis sin defendi.

La akacio, furioza vintra viktimo de antilopoj kaj ĝirafoj, informas siajn samspecajn arbojn pri la ĉeesto de predisto, eligante gason nomatan "etileno". La arboj kuŝantaj subvente, avertitaj pri la danĝero, en ĉirkaŭ dek minutoj komencas produkti grandajn kvantojn de tanino, kiu en malmultaj horoj detruas la hepatojn de la antilopoj. Kontraŭe, la ĝirafoj lernis ne fidi je tiuj arboj: ilia dieto estas pli diversigita kaj, precipe, ili komprenis, ke necesas sin nutri kontraŭvente, evitante tiamaniere manĝi foliojn tro riĉajn je tanino.

Kion inventos en la estonteco la akacioj por kontraŭstari la agadon de la ruzaj ĝirafoj?

Ne nur la arboj interparolas per kemiaj signaloj, sed ankaŭ la fruktoj eligas dolĉan murmuradon.

Pomo iomete tro matura sufiĉas por fuŝi la aliajn en la sama korbo. Ankaŭ ĉiokaze la heroldo estas etileno: ĉi tiu gaso, kiu disvastiĝas el frukto al alia, stimulas sian propran produktadon.

Por eviti tro rapidan maturiĝon de fruktoj kaj legomoj, kelkaj sciencistoj kreis ilin senparolaj. Iliaj unuaj kobajoj estis tomatoj: blokante du genojn respondecajn pri la produktado de etileno, ili obtenis fruktojn, kiuj ĝis la centa tago estis ankoraŭ verdaj, dum la aliaj (sovaĝaj) maturiĝis jam je la sesdeka tago. Bonŝance, la tomatoj iĝis senparolaj sed ne surdaj: post ses tagoj en ujo, kie la aero entenis etilenojn, ili ruĝiĝis kaj maturiĝis.

*El la originala artikolo de François Féron, en la libro "Gli spinaci sono ricchi di ferro – I luoghi comuni della scienza" de Jean-François Bouvet.*

# La turisma vilaĝo "Bela Fenikso"

*uzas Esperanton*



中国泾川·锦秀凤凰旅游度假村

■ Zhao Yonggang Xu Qing (Ĉinio)

Laŭ propono de Trezoro Huang Yinbao, direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto, la turisma vilaĝo "Bela Fenikso" en urbeto Jingchuan, Pingliang akceptis Esperanton en la Enkonduko pri la turisma vilaĝo. La direktoro de la investanto de la turisma vilaĝo promesis uzi Esperanton kiam ili faros novajn nomŝildojn en la pejzaĝo.

La turisma vilaĝo "Bela Fenikso" en Jingchuan, Gansu, projekto investita de la Kompanio por Kulturisma Eksploatado "Bela Fenikso" en Gansu (klr.), estas grava kaj situas sur la antikva Silka Vojo - en la grava vilaĝa urbeto Chenguan de gubernio Jingchuan en urbo Pingliang. Depende de la regionaj avantaĝoj de la unikaj turismaj rimedoj en Jingchuan: 5A nivela pejzaĝa regiono la Monto Kongtong, 4A nivela pejzaĝa regiono la Templo Nubego. 4A nivela pejzaĝa

regiono la Ĉiela Reĝina Palaco, 4A nivela pejzaĝa regiono la Templo Draka Fonto, 4A nivelaj pejzaĝaj regionoj la Valo Tianjiagou kaj la Suda Groto, la projekto konformas al la tutlanda plano konstrui kompleksan sistemon. La projekto, kies regiono estas 1000 muoj, kaj kies investa sumo 150 milionoj da juanoj, estos konstruita en du etapoj. Ĝi estas kompleksa turisma programaro kun kultura ekskurso, rigardo al floraro, amuzado por infanoj, spektado al bestoj, spertiĝo en homa groto, ĝuo de lokaj tipaj manĝaĵoj, sanigo en kamparo, konatiĝo kun nemateriala kultura heredaĵo kaj partopreno en moderna agrikultura turismo.

La pejzaĝa regiono "Bela Fenikso", kiu havas abundajn agrikulturajn rimedojn, profundajn kulturajn kuŝeojn, unikajn lokajn elementojn, belan ekologian medion, evidentajn

regionajn avantaĝojn, konservas la originalan naturan aspekton kaj perfektan ekologian medion, kunportas abundajn kulturajn heredaĵojn kaj bonajn kutimojn de lokaj popolanoj. La ekologia turismo povas kontentigi la modernajn urbanojn, kiuj sopiras vivi en natura medio kaj eskapi el la homplena kaj poluita urbo kun streĉa premo. Ĝi estas natura kampara sanigejo kaj libera sankta feriejo.

Laŭ la ĝenerala ideo pri konstruo de ideala kampara komplekso, ni planas grandan ekologian ŝablonon kaj prenis la modelon "Ĉefa entrepreno + Kunlabora komunumo + kamparanoj", por ligi turismon kun forigo de la malriĉeco de la vilaĝanoj, por krei novan turisman platformon kun perfekta ekologia medio, pitoreska pejzaĝo kaj bonhavaj vilaĝanoj.

# Broditaj feniksparoj



中国涇川·锦秀凤凰旅游度假村

# La turisma vilaĝo “Bela Fenikso”



中国涇川·锦秀凤凰旅游度假村



## La ŝlosilo al flueco:

# Frua legokapablo

*Teksto de Helen Abadzi (Grekio)*

*Traduko de P.V.Ranganayakulu\* (Barato)*

Ĉiun 8-an de Septembro, je Internacia Tago de Alfabeteco, mia memoro iras al la analfabetulino de mia junaĝo. Malriĉeco kaj etna konflikto en mia lando Grekio estis severaj multajn jardekojn antaŭe, sed ili prezentas samajn edukajn problemojn hodiaŭ.

En la 1930-aj jaroj, kiam kamparaj knabinoj apenaŭ iris al lernejo, du onkloj en Ateno dungis unu junulinon. Ili estis instruistinoj kaj diligente instruis al ŝi legi relative koheran Helenan ortografion. Maria lernis literojn sed neniam progresis preter unuopaj vortoj. Eventuale ŝi rezignis. Ŝi prizorgis geknabojn kiuj studis antaŭ ŝi, sed mortis kiel analfabetulo en siaj 90aj jaroj.

Etaj konfliktoj kaj deŝovo forrabis la oportunon de la fratino de mia patro. La familio forfuĝis de Turkio al Grekio en 1922, ŝiaj gepatroj mortis, kaj ŝi neniam iris al lernejo. Ŝi akiris fundamentan legoscion en siaj 40aj jaroj, de sia filino kiu estis instruistino. Ŝi pasigis 50 jarojn en granda urbo, ĉirkaŭita de presaĵoj. Sed kiam mi testis ŝin je ŝia aĝo 97, mi eltrovis ke ŝi povis legi nur majusklaĵajn literojn kun hezitemo. Plejbonokaze, ŝi komprenis etikedojn sur la busoj.

Tute malsimila estas la rendimento de Sofia, kiu prizorgis min. Elradikigita el Turkio en 1922, ŝi ĉeestis unuan gradon en lernejo antaŭ ol ŝi fariĝis senhejma orfo. Kiam mi estis lernigata legi, ŝi estis la persono, kiu helpis min. Ŝi ellegis teklibrojn haltante, kaj ni estis mokridantaj. Sed ŝi povis procezi plenajn frazojn, do ŝi daŭre ekzercis kaj pliboniĝis. En la lastaj jaroj de sia vivo, ŝi surmetadis okulvitrojn, malfermis tagjurnalon, kaj legis novaĵon por mia

patrino.

### Adolta disleksio

Jardekojn poste, kiel fakulo pri eduko ĉe la Monda Banko, mi observis kaj taksis legokapablajn projektojn por adoltoj. Registaroj kaj Neregistaraj Organizaĵoj klopodis instrui plenkreskulojn en la 1980-aj kaj 1990-aj jaroj, sed la kazoj rememorigis al mi miajn junaĝajn bildojn. En Bangladeŝo, lernantoj deĉifris literojn kun peno, eĉ post unu jaro da ekzerco. En Burkina Faso, plenkreskuloj, kiuj finis siajn kursojn, legis haltante, kaj eĉ havis problemon kompreni siajn proprajn manskribaĵojn. Kontraste, malmulte edukitaj personoj en sia infanaĝo, legis flue, kiel Sofia. La diferenco estis rimarkinda.

Ne nur tiuj needukitaj plenkreskuloj, kiuj legas kun peno. Edukitaj fremduloj, kiuj lernas lingvojn kun nekonata literaro spertas samajn malfacilaĵojn. 'Okcidentaj' akademiuloj kaj volontuloj, kiuj pasigas jardekojn en Etiopio aŭ Bangladeŝo eble parolos la lingvojn de tiuj landoj flue, sed por ĉiam ili legas en tiuj lingvoj kiel mezkomencantoj. Ili raportas ke vidiĝas miksaĵo de literoj, kiuj devus esti deĉifrataj unu post la alia. Tiel, legado estas teda afero kaj multaj el ili evitas tion.

Tiuj eventoj montras al ni traŝan fenomenon, kiu nomiĝu adolta novlegscia disleksio. Eble tio fariĝas grava je la aĝo 19 kaj verŝajne afektas nin ĉiujn. Universitataj studentoj, kiuj devas lerni diversajn skribsistemojn post la aĝo 18 tipe legas malrapide, kaj dum jardekoj havas malfacilecon skani la tekston.

Diversaj konaj kaj neŭrosciencaj studoj montras longdaŭrajn legoproblemojn en plenkreskuloj. Adolta disleksio eble klarigas parte povrajn rezultojn de la programoj por adolta legoscio tra la mondo. Sed tio iris neperceptebla. Fakuloj pri eduko kutime atribuas tiujn malsukcesojn al sociaj aferoj, motivo de lernanto, aŭ organizaj problemoj. Tiuj ĉi estas certe gravaj, sed la rezultoj inter tiuj, kiuj persistas estas malkuraĝigaj. Kaj ĉar tiu stranga disleksio restas nevidite, tre malmulta esploro okazis en tiu ĉi afero.

Sed kio estas senpena legado kaj kial ĝi estas grava? Tiu ĉi kapablo ŝajnas kiel tre normala vojo de lerno-vojaĝo en infanaĝo, sed ĝi bezonas specifajn ŝanĝojn en la cerbo.

### Infanoj estu inkulitaj per legoscio

Legado originas kiel funkcio de percepta lernado; en la unuaj milisekundoj, tio estas senliga de la signifo. Ekzercante, la formo de literoj estas arigataj kaj procezataj en la cerbo samtempe. La cerbo faras tiun ĉi agon efike se la simboloj estas instruataj unu post la alia, kun skemaj analogioj. Ekzerco kombinas etajn unuojn en grandajn. Sed en ĉiuj kulturoj, de Francio ĝis Ĉinio, homoj uzas la samajn cerbo-strukturojn legi.

Komence, lernantoj deĉifras unuopajn literojn kaj aplikas konscian klopodon. Post ekzercado kaj procezado moviĝas la parto de cerbo, kiu rekonas vortojn kvazaŭ ili estus vizaĝoj. Tiam, multaj literoj estas deĉifrataj en unu ekrigardo, same kiel

vizaĝtraĵoj. Samtempe, legado fariĝas senpena, aŭtomata. Ni ne povas ĉesi legi, same kiel ni rekonas la vizaĝojn de tiuj, kiujn ni konas. Tio okazas je kvardek kvin ĝis sesdek vortoj en unu minuto.

Danke al percepta lernado, homoj povas lerni rekoni spurojn, muziknotojn, numeralojn, matematikajn ekvaciojn, astronomiajn konstelaciojn, aŭ veterprognozajn signojn. Kaj kiam tiu vidfunkcio estas lernita kaj ekzercata ree, tio estas apenaŭ forgesata. Tiel la infanoj estu 'inokulita' per legopovo.

Strange, ni ne devas scii lingvon por legi ĝin flue, nek ni bezonas ebligi nin skribi tiujn literojn! Milionoj da infanoj tra la mondo lernas legi, por religiaj celoj, tekstojn en nekonataj lingvoj, kiuj malsimilas la oficialajn lingvojn de la lando. Tio multe helpas lerni koheran literumadon, kiel la hispana aŭ la hindia ol la senkoheran, kiel la angla aŭ la khmera. Sed kompreni la tekston, ni devas esti fluaj. La limigoj de mallongdaŭra memoro postulas rapidecon. Edukitaĵoj eble povas legi de 250 ĝis 350 vortojn en unu minuto.

Infanoj, kiu forlasas la lernejon akirinte tiun aŭtomatecon, povas legi presitajn signojn en la ĉirkaŭaĵo, kaj tiel akiras sufiĉan ekzercon daŭrigi la lertecon kaj plibonigi ĝin. Tio estas la ekzemplo de Sofia, mia infanaĝa prizorginto. Sed, se ili marĝeniĝas antaŭ ol akiri fluecon, liter-post-litera deĉifrado estas tro teda. Kiel Maria kaj la fratino de mia patro, ili eble preterpasas butiksignojn kaj stratnomojn, sed ne povas legi ilin.

Malbonŝance, la ebleco de infanoj aŭtomatigi la grandan aron da simboloj havas limon. Kelkaj neŭrocirkvitoj implikitaj en perceptado havas delikatajn fazojn kaj iom post iom malrapidiĝas dum la adoleska periodo. Se la procezo aŭtomatigi legadon estas interrompita por jaroj, valora tempo perdita estas maleble regajnta.

## Flueco je la aĝo 18

La grand-skalaj rifuĝ-delokiĝoj de la dudek unua jarcento kreis perfektan analfabetecan ŝtormon. La instruateco de multaj infanoj estas rompata je krizaj momentoj. Moviĝante de Sirio al Grekio kaj al Germanio, ili eble ne aŭtomatigas sian perceptadon defiantan skribsistemon

de la araba. Por kelkaj, la disrompo estas porĉiama. Kaj delokiĝo ne estas la nura minaco al infanaĝa legosciakiro. Landoj kun malaltaj enspezoj plivastigis instruatecon kun nesufiĉa scio kiel instrui la malriĉulojn, kaj la rezultoj kreis generacion de instruataj analfabetuloj. La problemoj pliiĝas pro la uzo de la angla kaj la franca, kiuj havas komplikajn literumadon. Tiel, multnombraj afrikaj studentoj povas laŭeble deĉifri nur kelkajn literojn aŭ vortojn en tiuj lingvoj. Kelkaj ĉeestas adult-legoscio-klasojn kiel plenkreskuloj, sed tio estas tro malfrue por aŭtomatigi, laŭ la Monda Banko.

Tiuj ĉi neŭrologiaj realaĵoj havas implicojn ankaŭ por la Daŭripovaj Evoluigaj Celoj (SDGs). Laŭ tio, la registaroj devus certigi ke ĉiu junulo kaj la konsiderinda nombro de adoltoj, kaj viroj kaj virinoj, atingu alfabetecan kaj kalkuloscion je 2030. Faciligi la lernoprocezon kaj la laboron de la instruistoj, esploro pri neŭroperceptado estu uzata.

Por akiri la perceptan lernofunkcion, komplekso da instrumentoj ne estas gravaj. Instruistoj instru literon post litero kun prononco kaj skemajn analogiojn, kaj donu sufiĉe da ekzercoj en la klaso, kun retrokuplado. Ekzerco ligas malgrandajn unuojn en la grandajn partojn, vortojn kaj frazojn. Abundaj libroj estas nemalhaveblaj por evoluigi 'vizaĝ'-rekonan kompetentecon. Ili devus uzi literojn, kiuj estas grandaj kun sufiĉa interspaco akomodi la vidpovajn postulojn de la cerbo. Skribado apogas legadon, kaj la vortojn oni lernu por kompreni la signifon de la tekstoj. Ĉar la legprocezo estas universala, po 45 ĝis 60 vortoj minute estus proksimuma etalono por aŭtomateco en preskaŭ ĉiu lingvo kaj skribsistemoj. Lerni de la tekstoj kaj ĝui la legadon, tiu rapideco devus esti akirita je la fino de la dua grado.

Patronoj kaj registaroj ricevas sufiĉe da konfuzigaj sugestoj pri la legado. Tradiciaj liter-post-litero metodoj, kiuj estis konfirmitaj al cerboevoluo estis anstataŭigitaj de tutlingvaj agadoj, kiuj spegulas mezklasan perceptadon. La influoj je la malriĉuloj povas esti severaj. La studentoj de la lingvoj, kiuj posedas konsistan literumadon, eble lernas sufiĉan legopovon en la unua grado travivi la sekvantajn interrompojn. Malnovaj silabaroj estas uzataj atingi tion. Sed pli da modernaj metodoj

malrapidiĝas la procezon, lasante studentojn sendefendaj al neimageblaj ŝokoj de la vivo, kiuj igos ilin esti praktike analfabetaj.


La Monda Legoscia Tago servas remomorigi al ni, ke ni devus havi aŭtomatecon en la infanaĝo. Tiu ĉi aĝo havas limon: ĉiu infano devus esti flua en unu aŭ pluraj skriptoj je la aĝo 18 maksimume. En la estonteco, esploro en biomedicino eble mildigos tiun ĉi neŭrologian fenomenon, sed je 2030, la celo estas klara. Militoj kaj formoviĝoj de loĝantaro ŝajnas esti trajto de homa evoluo, sed la eduka komunumo devus esti preta. La registaroj kaj patronoj devus apliki la esploron estantan por atingi transiron al aŭtomateco en la unua grado. En la kazo de ekaperanta interrompo, la adoltoj devus plenumi taskojn kiel Sofia ne kiel Maria.

*(Traduko el Unesko-Kuriero en angla lingvo. n-2, 2017).*

**\*D-ro Potturu Ranganayakulu,** kuracisto en ajurvedo, profesoro en Ajurveda kolegio en la urbo Tirupati, historiisto kaj estro de du muzeoj en Tirumala kaj Tirupatien Barato, eklernis esperanton en 1979, okazigis tutlandan esperantokongreson en 1983, organizis la 5-an Azian Kongreson en 2008. Li estis sekretario de la tutlanda organizaĵo Federacio-Esperanto de Barato, verkis Esperantan lernolibron *Let's Learn Esperanto* en 1993. Li ŝatas vojaĝi, instrui kaj verki. Ek de julio de 2017, li fariĝis membro de la teamo de Unesko-Kuriero en Esperanto ([http://www.uea.org/revuoj/unesco\\_kuriero](http://www.uea.org/revuoj/unesco_kuriero)).



*D-ro Potturu Ranganayakulu*



# La pavino - princino

■ *Ji Yingeng (Ĉinio)*

Antaŭ multe da jaroj estis princo nomata Zhao Ŝutun. Li loĝis en la lando Mengbanna. Ĉiuj lin ŝatis, ĉar li estis kuraĝa, fortika kaj bonkora.

Nokte, kiam li ekdormis, li havis sonĝon. En la sonĝo li vidis belegan pavinon. La pavino ŝanĝiĝis en junan belulinon. Ŝi estis la plej bela belulino en la mondo, kian li neniam vidis. Li diris al ŝi: "Ŝi estas la plej bela virino en la mondo." Vekiĝinte, li diris la sonĝon al sia patro: "En la sonĝo mi vidis la plej belan virinon en la mondo. Mi vidis la pavino-princinon."

"La pavino-princinon?" demandis la reĝo, "Kiel pavino povus esti princino? Tio estas nur sonĝo. La sonĝo estas stultaĵo."

Multe da belegaj princinoj volis edziniĝi kun Zhao Ŝutun, sed li diris: "Mi nepre edziĝos kun la pavino-princino. Mi neniam edziĝos kun alia virino. Mi ĉeirados la tutan mondon ĝis mi trovos ŝin."

La princo Zhao Ŝutun ekiris. Li transiradis la montaron kaj trairadis la arbarojn, demandante al multe da homoj: "Kie mi povos trovi la pavino-princinon?" Sed la homoj ridadegis, respondadante: "Pavino estas birdo, tamen princino estas virino. Kiel povus ekzisti pavino-princino?"

"Ĉu ne estas homo, kiu povus diri al mi kie trovi la pavino-princinon?" diris al ŝi Zhao Ŝutun.

Sed ĉiuj mokis lin.

Poste li atingis urbeton proksime al granda arbaro. Li vidis maljunulinon sidantan flanke de la vojo. Li demandis al ŝi: "Bonvolu diri al mi, kie mi povus trovi la pavino-princinon, sinjorino?"

Ŝi respondis: "Mi ne scias. Vi devas demandi al Lao Ren. Li loĝas en la kaverno en la arbaro. Li scias ĉion."

Tiel Zhao Ŝutun iris al la arbaro. Li iris pli kaj pli profunden. Fine li alvenis al la monteto en la mezo de la arbaro. Sur la montdeklivo estas kaverno. Li vokis, "Lao Ren! Lao Ren!"

Maljunulo elvenis el la kaverno, demandante: "Kion vi volas?"

"Mi volas trovi la pavino-princinon," Zhao Ŝutun respondis.

"Kiun pavino-princinon? Ekzistas sep pavino-princinoj."

Zhao Ŝutun diris al Lao Ren sian sonĝon.

"Mi estas la princo de la regno Mengbanna kaj mi edziĝos kun neniu escepte de unu el la sep pavino-princinoj," diris li.

"Venu post mi," Lao Ren diris, "Ili venas al la blua lago en ĉiu sepa tago. Mi montru al vi la lokon."

Lao Ren kondukis Zhao Ŝutun al la rando de la lago. La akvo en la lago estas tiel blua kiel la ĉielo.

"En ĉiu sepa tago," diris la maljunulo, "la sep pavino-princinoj venas al la rando de la lago. Ili aspektas

kiel pavinoj, sed fakte ili estas princinoj. Ili demetas de si la pavinan veston, lavas sin kaj ludas en la akvo. La plej juna el la sep princinoj estas la plej bela. Ŝia nomo estas Namnona."

La malunuloj kaj la princo kaŝiĝis inter arboj.

"Hodiaŭ estas la sepa tago," Lao Ren diris, "ili venos tuj."

Post momento Zhao Ŝutun aŭdis sonon en la ĉielo.

Sep belaj birdoj malsuprenflugis. Ili, demetinte de si la pavinan veston, kantis kaj ludis en la akvo.

Zhao Ŝutun diris: "Mi vidis tiun princinon, la plej junan, en la sonĝo. Ŝi estas la plej bela virino en la mondo."

La princinoj elvenis el la akvo kaj surmetis la veston.

La princo Zhao Ŝutun iris antaŭen kaj diris: "Oh, princino Namnona, lasu min paroli kun vi kelkajn vortojn antaŭ ol vi forflugos."

"Kiu vi estas?" demandis la princino.

"Mi estas princo Zhao Ŝutun. Ĉi tiu estas Lao Ren, kiu scias ĉion. Li scias ke mi estas bona homo kaj neniam vundos vin."

Tiel Namnona restis kaj parolis kun la princo kaj ŝi ekamis la princon. Donante al li sian ringon, ŝi diris, "Ĉiufoje, kiam vi vidos la juvelon sur la ringo, vi tuj vidus min."

Zhao Ŝutun diris, "Iru kun mi al



mia lando kaj ĝu mia edzino! Tiam mi povos ĉiam vidadi vin." Sekve la princo Zhao Ŝutun kaj la princino Namnona iris al Mengbanna kune.

La reĝo kaj la reĝino de Mengbanna tre ŝatis Namnona, sed Lo Ren kolereĝis. Lo Ren estis la grandulo, kiu helpas la reĝon regi la landon. Li ne volis, ke la princo edziĝu kun Namnona, li volis, ke la princo edziĝu kun lia filino.

Lo Ren ŝtele sendis leteron al la reĝo de la lando nomata Tung. Tio estas la plej proksima al Mengbanna lando. En la letero li diris, "La princino Namnona estas la plej bela virino en la mondo, sed mi ne volas, ke nia princo edziĝu kun ŝi. Venu kune kun via armeo, mi helpos vin."

Ĉio por la nupto de Zhao Ŝutun kun Namnona estis preta. Sed, en la tago antaŭ la nupto, la reĝo de Tung sendis sian armeon ataki Mengbanna.

La princo Zhao Ŝutun komandis la soldatojn de Mengbanna batali kontraŭ la armeo de la reĝo de Tung.

Samtempe Lo Ren iris al sia reĝo kaj diris: "oh, nia armeo estis venkita kaj la princo Zhao Ŝutun estis mortigita. La reĝo de Tung batalos ĝis li akiras la pavino-princinon. Vi devas mortigi la princinon: tiam li retiros sian armeon."

Namnona diris: "Se mi nepre devus morti, mi esperus morti surmetinte mian pavino-veston."

La reĝo donis al ŝi la pavino-veston kaj ŝi surmetis ĝin.

Tuj kiam ŝi surmetis la veston, ŝi povis flugi. Ŝi forflugis al sia patrujo.

Zhao Ŝutun gvidante la armeon revenis en la urbon. Li demandis: "Kie estas la princino Namnona?"

Kiam li eksciis kion Lo Ren faris, li tuj mortigis lin kaj diris: "Mi iros kaj trovos la princinon."

Li alvenis al la rando de la lago, kie li renkontiĝis kun Lao Ren.

Li demandis Lao Ren, la maljunulon: "Kie mi povas trovi Namnona? Kie estas ŝia lando?"

Lao Ren respondis: "Ĝi estas treege malproksima de ĉi tie. Vi devas iradi multe da tagoj kaj poste transpasi lokon, kie ne troviĝas akvo. Vi devas supreniri blankan monton, kies deklivo estas tiel glata kiel vitro. Vi devas transpasi varmegan riveron, kies akvo estas tiel varma ke neniu povas naĝi en ĝi kaj super la rivero ne ekzistas ponto. Ĉu vi povos transpasi ĉi tiujn danĝerejojn?"

"Jes," firme diris la princo, "sen la princino mi ne volas daŭre vivi."

"Prenu tiun ĉi magian bastonon. Ĝi estas farita el fero. Ĝi ĉiam montros la urbon de la pavino-princino kaj ĝi helpos vin en ĉiuj danĝeroj."

Zhao Ŝutun iris multe da tagoj kaj alvenis en la lokon, kie ne estas akvo. Tie estis nek akvo, nek arboj kaj la suno estis tiel varma kiel fajro. Li kuŝiĝis malsate kaj soife apud rokego, dirante: "Mi ne povas daŭre iri. Mi mortos ĉi tie kaj neniam vidos Namnona." Subite li rememoris la vorton de Lao Ren kaj frapis la rokegon per la magia bastono. Akvo tuj elŝprucis el la rokego kaj li estis savita.

Li alvenis al la blanka monto kaj provis grimpi sur ĝin, sed ĉiufoje li falis. Fine li diris al si: "Kiel mi povas grimpi sur ĝin? La montdeklivo estas kvazaŭ vitro kaj ne ekzistas la loko, kie mi povas meti miajn piedojn."

Li elprenis la magian bastonon kaj per ĝi batis la montdeklivon. Samtempe la monto breĉiĝis kaj li rapide trakuris ĝin.

Poste li atingis densan arbaron. Li vidis du birdegojn

sidantajn supre de alta arbo. Li grimpis sur la arbon kaj saltis sur flugilon de unu el la birdoj. Li kaŝis sin tie.

Sekvantan matenon la birdegoj transflugis la varmegan riveron kaj daŭre flugis al la urbo, kie loĝas la pavino-princino.

Kiam Zhao Ŝutun iris laŭ strato, li vidis virinon portantan poton da akvo. Li demandis: "Kien vi portas la poton da akvo?"

Ŝi diris: "Mi portas ĝin al la princino Namnona."

Li demetis la ringon de sur sia fingro kaj faligis ĝin en la akvopoton en la momento, kiam la virino ne atentis.

La servistino portis la akvopoton al la palaco. Ŝi verŝis la akvon sur la korpon de la princino kaj la ringo elfalis el la pot. Namnona ekkrietis: "Tio ĉi estas mia ringo. Tio ĉi estas la ringo, kiu mi donis al Zhao Ŝutun. Kiel ĝi envenis en vian akvopoton?"

La servistino diris: "Mi renkontis junulon sur la strato. Li demandis: 'Kien vi portas la poton da akvo?' Mi pensas ke tiu nepre estas li kiu faligis la ringon en mian akvopoton en la momento kiam mi ne atentis."

Namnona ĝojege diris: "Mia princo ne mortis. Li ankoraŭ estas viva. Li venis serĉi min."

Zhao Ŝutun edziĝis kun Namnona. Li fariĝis la reĝo de la lando de la pavino-princino. De tiam Zhao Ŝutun kaj Namnona ekvivis feliĉan vivon.





## *Gaja knabineto* **Matensuno** en *Esperantujo*

En la jaro 2015 la sepjaraĝa knabineto Matensuno komencis eniri Esperantujojn. Ŝi kune kun sia avino Sanoza partoprenis la 100-an UK-on kiu okazis en Francio kun aliaj kunvenoj kaj renkontiĝoj de Esperantistoj. Malgraŭ la fakto ke tiam ŝi estis tre juna komencantino, tamen dum tiu periodo en Eŭropo ŝi vivis en esperanta medio kaj ŝia kapablo rilate al la uzo de la lingvo rapide progresis. La uzo de Esperanto multe helpis ŝin. Ŝi bone konatiĝis kun aliaj esperantistoj kaj amikiĝis kun aliaj infanoj kiuj venis el diversaj landoj. Ŝi sentis feliĉega.

En la sekva jaro 2016 ŝi denove vojaĝis al Eŭropo. Ŝi partoprenis la infankongreseton kiu okazis en Nitra, Slovakio. Antaŭ la UK ŝi partoprenis la IJK-on kiu okazis en Wrocław, Pollando, kaj poste la ILEI-konferencon en Hungario. Post tio ŝi partoprenis la 20-an datrevenon de la renkontiĝoj de Esperantistoj en la 2-a Tutkelta Kongreso ĉe la bretona marbordo en nordokcidenta Francio.

Dum tiuj 40 tagoj en la internacia esperantujo de Eŭropo ŝi tre ĝuis la agrablan esperantan medion. Esperanto multe helpas ŝin amikiĝi per ludado kun infanoj el fremdaj landoj. Pro tio ŝiaj amikinoj de Ĉinio tre envias ŝin. Ŝi multe fieras kaj ofte diras ke ŝi estas feliĉa knabino.

*Raportas Sanoza (Ĉinio)*



## *Gaja knabineto*



## Matensuno en *Esperantujo*



# Kiom da parolantoj de Esperanto en Ĉinio?

■ *Solis Liu Xiaozhe (Ĉinio) \**

En la artikolo Esperanto en Ĉinio aperigita en la 1-a numero de Tra la mondo, mi skribis, ke nun en Ĉinio laŭ mia takso estas malpli ol mil homoj, kiuj povas paroli Esperanton en diversaj niveloj. Oni demandis min, de kie venis tiu nombro.

Mankas en Esperantujo firmaj

organizoj, kiuj povus ekzakte enketi datenojn pri Esperanto. Oni ankaŭ malfacile difinas, kio estas “scipovi paroli” iun lingvon. Sed taksu la nombron de Esperanto-parolantoj en Ĉinio ne estas tiel malfacile kiel oni imagas.

Antaŭ ĉio bonvole rimarku, ke mi

ne uzas la vorton esperantisto, pri kiu oni ofte disputas. Mi uzas la esprimon parolanto de esperanto, kiu pli klare karakterizas homojn, kiuj parolas Esperanton. Do tio simpligas la aferon.

En Ĉinio estas malmultaj parolantoj de Esperanto, kion mi povas konstati per miaj renkontiĝoj kun lernantoj



S-ro Liu Xiaozhe (Solis)

kaj subtenantoj de Esperanto, dum mia vojaĝo en diversaj provincoj. En iuj urboj, kvankam la mezuro de la Esperanta movado estas granda, tamen plejparto de la partoprenantoj estas nur subtenantoj de la ideo de Esperanto, sed ne parolantoj de tiu lingvo.

En fotoj raportantaj pri la Esperanta movado en Ĉinio, oni povas vidi multajn partoprenantojn, kiuj plejparte fakte ne scipovas paroli Esperante. Iuj prezidantoj de Esperantaj asocioj scipovas diri nur "Saluton" en Esperanto. Nia asocia estro, kiu fervore laboras por Esperantaj laboroj, skribis "jis laivedo" ("ĝis revido") por adiaŭ nin en la reto.

Pro la malmulteco de parolantoj de Esperanto, en la sama urbo kaj eĉ en la sama provinco, preskaŭ ĉiuj parolantoj konas unu la alian. Nome, se iu kapablas paroli Esperante, certe li scias, kiuj aliaj en la loko povas paroli tiun lingvon, kaj certe li estas konata de aliaj parolantoj.

Por ricevi relative precizan nombron, mi afiŝis en la Ĉina Esperanta Forumo, petante helpon de parolantoj de Esperanto el aliaj provincoj de Ĉinio. Mi petis, ke oni prezentu al mi jenajn ciferojn: Kiom da loĝantoj estas en viaj urbo kaj provinco? Kiom da parolantoj de Esperanto estas en viaj urbo kaj provinco?

Unue mi mem respondas pri la nombroj de niaj urbo kaj provinco: En nia urbo Urumqi (la ĉefurbo de la provinco) estas 3,5 milionoj da loĝantoj, el kiuj estas 3 parolantoj de Esperanto. En nia regiono (provinco) Xinjiang estas 23 milionoj da loĝantoj, inter kiuj estas ĉirkaŭ 5 parolantoj de Esperanto.

**S-ro Venki** (Zhao Wenqi) informis min, ke en la urbo Guangzhou (la ĉefurbo de la provinco) estas 14 milionoj da homoj, el kiuj li konas 10 parolantojn. En la provinco Guangdong loĝas ĉirkaŭ 100 milionoj da loĝantoj, el kiuj estas 20 parolantoj.

**S-ro Ĉielismo** (Wang Tianyi) diris, ke en la urbo Xi'an (la ĉefurbo de la provinco) estas 8,2 milionoj da loĝantoj, el kiuj estas 5 parolantoj. En la provinco Shaanxi estas 37 milionoj da loĝantoj, el kiuj estas 10 parolantoj.

**S-ro Zhou Qi** diris, ke en la urbo Chengdu (la ĉefurbo de la provinco) estas ĉirkaŭ 14,3 milionoj da loĝantoj, en la provinco Sichuan estas 82 milionoj da loĝantoj. La 20 parolantoj en la provinco ĉiuj estas en la urbo Chengdu.

**S-ro Kolono** (Cao Baozhu) informis min, ke en la urbo Tianjin (administrata rekte de la ŝtato, kun la sama administra rango kiel provinco) estas 13 milionoj da loĝantoj, el kiuj ĉirkaŭ 25 povas paroli Esperanton. Tamen mi iom dubas pri tiu nombro. Komence li fanfaronis, ke en Tianjin estas 100 parolantoj, kaj poste li konfesis sian troigon. Sed mi suspektas, ke lia lasta nombro ankoraŭ estas troigita.

En urbego, kies loĝantaro superas 6 milionojn, la demandito rifuzis respondi la demandon, eble pro honto pri la nombro, murmurante, ke tia enketo estas sensignifa. Kaj dum mia enketo, ankaŭ aliaj kelkaj subtenantoj de Esperanto esprimis similan opinion.

Generale la ĉefurboj ekonomie kaj kulture estas pli progresintaj ol aliaj partoj de la provinco. Analizante la suprajn nombrojn, kunligante mian sperton, mi taksis, ke en la provinca ĉefurbo estas ĉirkaŭ 1 parolanto el miliono da homoj, kaj en tuta provinco estas ĉirkaŭ 1 parolanto el 3 ĝis 5 milionoj da homoj.

Ĉar la nombroj de la provinco jam inkluzivas tiun de la provinca ĉefurbo, tial mi kalkulas nur laŭ la nombroj de la provincoj. Nun en Ĉinio estas 34 provincoj aŭ samrangaj administrativaj regionoj kun 1406 milionoj da loĝantoj. Do laŭ la proporcio de Esperantaj parolantoj en provinco, la nombro en la tuta Ĉinio estas ĉirkaŭ 300 homoj.

Eble iuj opinias, ke la statistikantoj forgesis kelkajn parolantojn. Do ni duobligu la numerojn, kaj la rezulto estas 600 homoj. Se fidelaj samideanoj opinias, ke tiu numero damaĝas ilian senton, ni triobligu la nombron, sed la rezulto daŭre malsuperas la nombron 1000!

Mi diskutis tiun temon kun Esperanta veterano. Lia respondo estas pli malesperiga: Estas malpli ol 100 ĉinoj, kiuj bone parolas Esperanton! Mi pensas, ke eble li juĝas ĉinajn parolantojn laŭ sia lingva perfekteco.

Estas imageble, ke multaj subtenantoj de Esperanto abomenas min pro tiu malesperiga nombro. Do kial mi faras tion? Mi ne estas malamiko de Esperanto. Mi eklernis Esperanton antaŭ 35 jaroj, kiam mi estis 16-jara. Mi ne povas diri, kiam mi esperantistiĝis, ĉar ĝis nun mi ne kuraĝas diri, ke mi jam vere posedas tiun lingvon.

Mi enketas la nombron de ĉinaj Esperantaj parolantoj kun antaŭvidebla

mizera rezulto, ne por sonorigi la funebran sonorilon por Esperanto. Mi volas sonorile veki samideanojn!

Troaj mem-dignigo kaj fanfaronado estas la komunaj karakterizoj de malfortaj sociaj grupoj. Milionoj da parolantoj de Esperanto en la mondo estas malvera nombro. Sed ni mem devas sobre koni nian veran situacion. Ni ne estu trompitaj de la fumbombo pafita de ni mem.

Agnoski problemon estas bazo por solvi problemon. Solvi problemon eble estas nefacile. Sed problemo estas nesolvebla, se oni ne agnoskas aŭ eĉ kaŝas la problemon.

Ĉinoj konsistigas ĉirkaŭ 19% el la monda loĝantaro. La Esperanta movado en Ĉinio certe estas grava parto de tiu en la mondo. Internacia Esperanta movado sen Ĉinio estas nekompleta kaj kripla.

Kvankam la kvanto ne decidus ĉion, ĝi estas grava bazo de disvolviĝado de la movado.

En Ĉinio ne estas tiom da parolantoj, kiom oni propagandas. La veran nombron la subtenantoj ne volas agnoski, kaj ĝi estas ignorebla kompare kun la nombro de la loĝantoj en Ĉinio.

Kiu estas la kaŭzo de tia situacio? Kie estas la eliro? Ĉu restas espero je la Esperanta movado en ĉi tiu grandega lando?

*\*S-ro Solis Liu Xiaozhe estas la fondinto kaj administranto de la Verda Reto (<http://reto.cn>), la Ĉina Esperanta retejo. Oni povas skani la dudimensian kodon por rapide viziti la retejon. La artikolo aperis en la Verda Reto kaj Libera Folio.*



# Kial oni ne lernas Esperanton?

## ■ Solis Liu Xiaozhe (Ĉinio)

Komencantoj de Esperanto ofte fervore propagandas tiun lingvon al ĉirkaŭaj homoj. Ili sentas, ke tiu magia lingvo por ili malfermis la pordon al la mondo. Do ili esperas, ke ĉiuj aliaj homoj ĝuu tiun raraĵon.

Sed ili sen-esperiĝas ankaŭ tre ofte.

Oni trovas, ke multaj informitoj, sciinte la ekzistadon de la internacia lingvo, nur surpriziĝas pri la artefariteblo de homa lingvo, sed ili tuj forgesas ĝin turninte la atenton al alia afero. Iuj scivolaj forlasas la lernadon post nur kelkaj kursoj.

La komencanto denove estas la sola lernanto en la loko.

Kial? Kial oni ne varme brakumas tiun bonan lingvon kun bela interna ideo? Kial ilin ne interesas tiu lingvo, kiu povas forigi la lingvan baron en la internacia komunikado?

La kaŭzo fakte estas simpla: multaj homoj tute ne interesiĝas pri la lingva problemoj! Por ili, krom sia gepatra lingvo, la aliaj lingvoj, per kiu oni povas interflui kun ne samlingvaj homoj, estas tute superflujaj kaj ne-necesaj!

La amatoroj kaj interesatoj de iu afero inklinas opinii, ke ilia cel-it-aĵo estas la plej grava afero. Multaj subtenantoj de Esperanto ne konscias, ke estas aliaj pli gravaj aferoj ol la lingva problemoj por aliaj homoj.

Jes, Esperanto alportas al vi ĝojon kaj ĝuon, sed multaj homoj ankoraŭ baraktas por la manĝaĵo kaj vestoj, do ili ne havas tempon kaj energion pripensi la bezonon je spirito.

Jes, lokaj esperantistoj multe helpas vin dum via vojaĝo en aliaj landoj, sed multaj homoj eĉ neniam foriras el siaj naskiĝaj vilaĝoj aŭ urbo.

Jes, per Esperanto vi povas konatiĝi kaj interflui kun homoj en diversaj landoj, sed multaj homoj nur kontaktas homojn en la vivo kaj laboro, nehavante kelkajn aliajn konulojn eĉ en sia urbo.

Jes, per Esperanto vi povas legi informojn el diversaj partoj de la mondo, sed multaj homoj ne povas aŭ ne volas legi ĵurnalon eĉ en sia nacia lingvo.

Jes, Esperanto estas lingvo kun bela ideo, kaj partopreni en Esperanta movado estas kontribuo al la pli bela mondo. Sed

multaj aliaj homoj opinias, ke estas multaj aliaj aferoj pli gravaj ol la lingva problemoj en la mondo, ekzemple, malriĉo, malsato, medio, akva riĉfonto, klimato, homaj rajtoj, ktp.. Iu diktatura reganto opinias nuklean armilon plej grava, iu prezidinto opinias rajton de viro eniri virinan necesejon plej grava, iuj religi-anoj opinias mortigi ĉiujn ali-religi-anojn plej grava, iuj viktimoj opinias toleri kaj ami krimulojn plej grava.....

Iuj homoj ne lernas Esperanton, ĉar ili neniam aŭdis Esperanton. Sed plejparto de homoj ne havas intereson al Esperanto, eĉ jam detale informite pri tiu lingvo!

Ĉiuj havas propran intereson. Altrudi la sian al alia estas ne-efike kaj ofte malŝatate. Estas tute normale, ke oni ne interesiĝas pri Esperanto kaj ne lernas ĝin.

Do, kion ni faru? Ĉu ni ĉesu propagandi Esperanton al aliaj homoj?

Propagandado nepre estas farinda laboro, kio povas varbi latentajn lernantojn. Sed se oni ne interesiĝas pri nia lingvo, ni ne daŭrigu oferti ĝin al ili. Kaj ni ne tro senesperigu. Ĉar ne estas afero, kiu povas tiri ĉiujn homojn. Sufiĉas, ke ĉirkaŭaj homoj sci pri Esperanto, kaj ili mem elektu ĉu lerni aŭ ne.

Fakte, estas pli efika rimedo propagandi la lingvon Esperanto, nome, ni mem lernu kaj uzu ĝin en la internaciaj kontaktoj. Vidinte, ke Esperanto estas utila, la veraj interesatoj lernos ĝin. Ni influu aliajn homojn per nia agado, sed ne per senĉesaj ripetitaj vortoj. Kiel oni admonas iujn religi-anojn: agu pace, sed ne nur deklaru vian religion paca!



# 70 studentoj lernas Esperanton en Zaozhuang Universitato

La 18-an de oktobro, la Junulara Esperanto-Asocio de Zaozhuang Universitato fondis Esperanto-kurson en la Esperanto-Muzeo, kun 70 kursanoj. S-ro Sun Mingxiao, la vicĝenerala sekretario kaj estro de la Esperanto-Muzeo instruas Esperanton en la kurso, kaj Li Bochuan de la Junulara Esperanto-Asocio helpas instruadon. *Cui Xuefeng (Cinio)*



# 150 studentoj lernas Esperanton en Jiangsu-a Teknologia Universitato

中国·江苏理工学院




La 10-an de oktobro, s-ro Zhang Changsheng, vicprezidanto de ĈEL, prezidanto de Jiangsu-a Esperanto-Asocio, fondis Esperanto-kurson en la Jiangsu-a Teknologia Universitato en Changzhou. Ĉirkaŭ 150 studentoj lernas ĉiumarde.

*Zhang Changsheng (Ĉinio)*





# 1000 studentoj lernas Esperanton en la Artkolegio de Kunming



La 18-an de septembro la Artkolegio de Kunming malfermis devigajn Esperanto-kursojn por 1000 studentoj. La artkolegio dungis kvar Esperanto-instruistojn por instrui Esperanton. Ili estas Alessandra Madella el Italio, Choi Manwon el Koreio, Liu Baoguo kaj Li Lin el Ĉinio. S-ro Duan Yongxing, la prezidanto de la Artkolegio prelegis pri Esperanto en la malferma ceremonio.  
*Li Ling (Ĉinio)*



# 1000 studentoj lernas Esperanton en la Artkolegio de Kunming

# Profesia kaj Teknika Kolegio Pingliang en Ĉinio serĉas volontulojn por instrui la anglan kaj Esperanton



中国·平凉职业技术学院



La Profesia kaj Teknika Kolegio Pingliang, kun 500 laborantoj kaj 6000 studentoj, intencas inviti du-kvar fremdajn volontulojn por instrui la anglan lingvon kaj samtempe funkcigi Esperantan lecionon kiel la nedevigan programeron por interesitaj studentoj kaj instruistoj. La kandidatoj devas bone regi Esperanton kaj la anglan lingvon. La kolegio liveros al ĉiu volontulo senpagan loĝadon kaj monate 2000 RMB da honorario, kiu sufiĉas por pagi bonan manĝadon de minimume du homoj en la manĝejo de la Kolegio. La volontuloj povos volontuli semajnon ĝis 12 monatojn laŭ sia plaĉo. Al tiuj kiuj laboras pli ol 6 monatojn, la Kolegio repagos la koston de la dudirekta vojaĝo. Retejo de la Kolegio: <http://www.plvtc.cn/>.


Lokaj esperantistoj en Esperanto-Centro Ora Ponto en Ĉinio, pretas helpi instruadon de Esperanto en la Kolegio. Interesiĝantoj pri tio kontaktu s-ron Trezoro Huang Yinbao<[trezoro@qq.com](mailto:trezoro@qq.com)> kaj s-ron Ardo<[esphugp@126.com](mailto:esphugp@126.com)>. skajpo: [huangyinbao](mailto:huangyinbao).



S-ro Lei Zhihui  
Prezidanto de la Kolegio

# Pentrajo sur ŝtono

Pentristo: Wu Dongmei (Ĉinio)



《一带一路·环球》杂志（世界语版）· 2017 年第 4 期，  
国际标准刊号：ISSN 2512-5060  
中德合作 面向世界 讲一带一路精彩故事  
主办：德国哈慈国际文化交流中心  
出版：德国哈慈《一带一路·环球》杂志出版社  
社长：彼得·兹尔瓦  
编辑：泾川金桥国际科技文化交流中心（中国甘肃平凉）  
主编：黄银宝（联合国教科文组织世界语版《信使》杂志主编）  
电话 +86 (0) 933-3329289, 18893316800, QQ552319856